Metro

Metro (simbolo: m) estas la baza unuo por longo en la Sistemo Internacia de Unuoj (SI). Tiu longo-unuo donis nomon al tuta sistemo de mezurado, *la metra sistemo*, kiu baziĝas sur strikte difinitaj bazaj unuoj kaj ties dekobloj kaj dekonoj, centobloj kaj centonoj, milobloj kaj milonoj, ktp., kaj kiu realiĝas en iomete diferencaj versioj, nuntempe ĉefe en la Sistemo Internacia. La metra sistemo estas aprobita en la tuta mondo kaj praktike uzata preskaŭ ĉie ekster Usono.

Origine (1791) unu metro estis difinita egala al dekmilion-ono de kvarono de meridiano, t.e. dekmilion-ono de la distanco de la teraj ekvatoro kaj poluso. Post precizaj mezuradoj de meridianaj arkoj en Eŭropo kaj Peruo, oni konstruis t.n. *arĥivan metron*, platenan bastonon kun longo kiel eble plej ekzakte egala al la origina difino. Poste oni konstatis, ke difini la bazan unuon per mezuro de la Tero estas nepraktike kaj eĉ iom dubsence, kaj la arĥiva metro mem akiris statuson kiel difinilo de la nova longo-unuo.

Internacie la metro estis akceptita nur en 1867, post kiam la Asocio por Eŭropa Gradomezurado, antaŭaĵo de la Internacia Geodezia Asocio, decidis oficialigi ĝin en la tuta Eŭropo. Post pluraj Ĝeneralaj Konferencoj pri Pezoj kaj Mezuroj, estis subskribita la internacia Konvencio pri la Metro (1875) kaj fondita la Internacia Buroo pri Pezoj kaj Mezuroj. La nova Buroo produktis novajn metro-etalonojn, kun kversekco X-forma, el plateno-iridio, kaj en 1899 unu el ili estis elektita la nova prototipo de la metro. La prototipo estas daŭre konservata en Parizo, en kondiĉoj tiam difinitaj.

La scienco kaj tekniko de mezurado evoluis, kaj en 1960 estis adoptita nova, pli precize komparebla difino: ekde tiam unu metro egalis 1 650 763,73-oble la ondolongon de difinita radiado de kriptono (la transiro de kriptono-86 inter energio-statoj $2p_{10}$ kaj $5d_5$, la oranĝa spektrolinio de kriptono).

La difino de 1960 validis ĝis 1983. Tiam la 17-a Ĝenerala Konferenco pri Pezoj kaj Mezuroj akceptis eĉ pli precize mezureblan normon: unu metro egalas la distancon, kiun lumo trapasas en vakuo en unu 299 792 458-ono de sekundo. Tiu nova difino samtempe fiksas la lumrapidon, kiu ekde tiam do estas ekzakte 299 792 458 metroj en sekundo.

La redifinoj en 1960 kaj 1983 kompreneble ne celis ŝanĝi la metron, nur doni bazon por pli preciza mezurado.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Metro